

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., E<sup>o</sup>inburĝ  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 170  
16. 12. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.  
Tarifon  
vidu sur speciala folio, kiu estas aldona  
ala al ĉiu specimena kaj unua numero  
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Je la memoro al la Majstro.

La natur-potencoj regadas la universon, daŭre, eterne. Ili kreas, ili detruas, ili rekonstruas, ili pereigas.

La homa spirito klopodadas superi ilin. Senhalte progresas la sciencoj, malgraŭ malfacilaĵoj, spite de dumtempaj malsukcesoj.

Kaj por la paca konkuro la naturo donacas al ni geniulojn.

Homoj en la tuta mondo, de plej diversaj rasoj, religioj, pensmanieroj, membroj de ĉiuj nacioj, anoj de plej malegalaj lingvoj interkompreniĝas facile. La tutmondaj rilatoj simpliĝas. Erarkomprenoj pli malofitiĝas. Konfliktoj malpliĝas. La reciproka estimo pli fortiĝas pro ekkono de la vero. Dank' al la kreitaĵo de geniulo, Zamenhof.

Tutmonda anaro lin admiras. Benas la tagon de lia naskiĝo. Gloras lian laboron por la bono de l'homaro. Kaj el koro promesas plue kunhelpi al la sukceso de lia verko. Ĝis la venko!

Robert Kreuz.

Valoraj estas la detaloj el la vivo de Zamenhof kaj pri la deveno de nia helplingvo, interesaj la priskriboj pri la unua tempo de la ekzistado de Esperanto.

Ni represas tie ĉi eliron el privata letero de D-ro Zamenhof al s-o N. Borovko pri la deveno de Esperanto, el rusa lingvo tradukita de V. Gernet (Lingvo Internacia, 1896, n-o 6—7).

### El tiro el privata letero de D-ro Zamenhof al s-o N. Borovko.

... Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la Lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta publika historio de la lingvo, t. e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi estas al vi pli malpli konata, cetere tiun ĉi periodon de la lingvo estas nun pro multaj kaŭzoj ankoraŭ ne oportune tuŝadi; mi rakontas al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo. — Estos por mi malfacile, rakonti al vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis. La ideo, al kies efektiviĝo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis al mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis. Mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povis imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstinulo laboris super ĝi kaj kial mi malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo. — Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistis el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj: ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj malamike rilatas la aliajn elementojn. En tiu urbo pli ol ie la impreso natura sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo ke la diverseco de lingvoj estas la sola aŭ almenaŭ ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividigas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukis min kiel idealiston. Oni min instruis ke



### Je la naskiĝtago de l' Majstro.

15. decembro.

Kun festa brul'  
En koro, en okulo!  
Silenton rompu ni de l' tagoj grizaj,  
Kaj ĝojs-mor  
De solenanta hor'  
Anoncu finon de la tempoj krizaj.

La gloro sen'  
Ne kun timema trim'  
Sed kreska jam kun grandpromesa forto.  
Trens mon' kaj mar'  
Etendis sin sen bar'  
Por ligi gentojn per potenc' de vorto.

Sed antaŭ ol  
La Esperantopopol'  
Ekgojas pri la Estonteco flora,  
La fraŭl' gnt'  
Kun la malnova sen'  
Sin turnu al memor' de viro glora!

Li estis vir'  
Stampita de sopir',  
Vidaŭ! li estis en la mondo blinda  
Kaj akra s-r'  
De lia grandsopir'  
Instigis lin por farto admirinda.

Per batali'  
Mortigol' mil kaj mil'  
Herooj brilaj regis jam sur tero,  
Li estis pli;  
La amon poris li,  
Armilo lia estis sinotero.

Ho milda kor'  
Sed arda pro fervor'  
De kie prenis vi la forton spitan,  
Ke vi en sol'  
Eĉ kontraŭ ĝia vol'  
Elsavi provis mondon malbenitan.

Nek mok', nek rid'  
Sed stulto, nek perfid'  
Malhelpis vin en laborad' modesta.  
Ho hom-amant'  
Ne en fiero vant'  
Sed en sufero estis vi majesta.

Se en labor'  
La irosreĉita kor'  
Rompiĝis antaŭ la triumfa celo,  
Sed ĝia ve'  
El mondo de l' pere'  
Sin a'tesvingis, supren ĝis cielo.

La tomba sin'  
Kiu nun kaŝas vin  
Por la adeotoj estas alta templo  
Kaj por pilgrim'  
Alflugas la anim'  
Ke ĝin inspiru, Majstro, per ekzemplo!

Ni sekvos vin,  
Ĝis fine venos fin'  
Al mond-konfuzo, al kruela farto  
Kaj via stel'  
Per sia verda hel'  
Paligos ruĝan lumon de la Marso.

K. de Katošay.

ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume ĉio sur la strato kaj sur la korto, ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas, ekzistas nur rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi „doloro por la mondo“ ĉe la infano, ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la „grandaĵaj“ posedas ian ĉiupovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĵa mi nepre forigos tiun ĉi malbonon. — Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ĉio ne fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano. Unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn okupojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam kompreneble sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras, kiam, sed en ĉiu okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povus esti nur neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi trairis en la Varsovia duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de la lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la tuta mondo kaj per flamaĵoj inklindos la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por la komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla. Kaj mi komencis malklare revii pri nova aparta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn ktp. Sed homa lingvo kun sia, ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun siaj centoj da miloj da vortoj, per kiuj min timiĝis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tiel artifa kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diris al mi: „For la revojn! Tiu ĉi laboro ne estas laŭ mia homa forto“. — Kaj tamen mi ĉiam revenadis al mi revu. — Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en la infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn. Sed kiam, estante en kvina klaso de la gimnazio, mi komencis ellernadi la anglan lingvon, la simpleco de la gramatiko jeĝiĝis en miajn okulojn. Precipe dank' al la krua transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka, mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de la gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵajn formojn. Kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fardonĝadi al mia revo, sed la malgranda vortaro ne lasis min trankvila. Unu fojon, kiam mi estis en sesa kaj sepa klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo „ŝvajcarskaja“ (trinkejo), kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo „konditorskaja“ (sukeraĵejo). Tiu ĉi „skaja“ ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufikso donos la eblon el unu vorto fari aliajn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj kaj sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj al mi komencis rapide malpliĝandiĝadi antaŭ miaj okuloj. „La problemo estas solvite!“, diris mi tiam.

# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informo, ni bezonas sciigojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unufanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

## Landoj.

### Ameriko.

#### Kubo.

Pluraj samideanoj skribas al ni pri revigliĝo de la laboro de la Societo Kuba por la propagando de Esperanto. Oni propagandas ankaŭ speciale inter komercistoj. En Camaguey vigle propagandas nigra samideano s-o Denniston (antaŭe en Jamaiko).

#### Venezuelo.

En Caracas mortis subite s-o Antonio S. Bricieño malnova Esperantisto. Kvankam li depost longa tempo jam ne plu estis aktiva, li tamen neniam perdis la intereson pri nia afero. Venezuelaj samideanoj funebros pri li.

### Eŭropo.

#### Aŭstrio.

Graz. Ege vigliĝis la ĉiuvendredaj kunvenoj de la loka grupo Graz de la Esp. Unuiĝo por Sirmo sekve de la dankindaj penadoj de l' nova grupestro D-ro Halbedl. Okazis jam kelkaj interesaj paroladoj de s-o Schoenemann pri sia 3-monata restado en Finnlando kaj prelegoj de propraj iradukoj de Prof. Hainschega, kiu post nur kelkmonata studado de nia lingvo fariĝis vera eminentulo.

#### Hackl.

Korneuburg. La Esp. movado komenciĝas tie ĉi. Inspektoro Steiner gvidas du kursojn kun pli ol 40 personoj. Fondo de grupo plej baldaŭ okazos. La ĉi tiea gazeto „Gemeindewoche“, kies redaktoro Wiedermann nun ankaŭ estas ano de nia lingvo kaj vizitas kursojn, ĉiusemajne favore raportas pri Esp. movado kaj aferoj. — Informojn donas tre volonte s-o Steiner, Bisamburg 248 apud Wien.

### Francujo.

Hyères (Var). Mortis 85-jara s-o Philippe Hedde, pensionita oficiro de l' franca maristaro, kavaliro de la Honora Legio, partopreninta la Karavanon de UEA Genève—Dresden okaze de la IV-a Kongreso; li estis entombigita en Le Puy (Haute-Loire).

### Grekujo.

Oni informas nin pri pligrandiganta intereso al Esp. en Grekujo. Kelkaj samideanoj troviĝas en Ateno. En Pireo laboras aktive s-o Ionomidis.

### Italujo.

Milano. La 18. nov. okazis la ordinara ĵara kunveno de Esperanta Domo en Milano. La morala kaj financa raportoj farita de la sekretario estis unuanime aprobita. Dum la diskutoj oni esprimis deziron, ke Milano komencu sin prepari por la gastigo de la XVII-a Universala Kongreso, kaj pri tio ĉi zorgu efice la konsilantaro de Esperanta Domo. La elektoj donis jenajn rezultojn: prez. D-ro Angelo Filippetti, viceprez. D-ro Giovanni Girola, sekr.-kas. Nels. Ispeit. Giovanni Tanzi, konsilantoj Cattorini Luciano, Ciribini Angelo, Ghezzi Angelo, Nobile Gaetano, Piatti Ippolito, Ing. Pioniskier Michele, Stella Francesco, Zanaboni Mario, revizoroj Busso Giovanni, Sacchi Oreste, Valli Umberto. — Estas decidita la aranĝo de Esp. ekspozicio en printempo de la jaro 1924. Por tio oni komencas la kolekton de Esperantistoj kaj konvenaj objektoj.

### Rusujo.

Astrahanj. Refunkcias nia rondeto ĉe laborista klubo „Naemjen“, gvidita de F. Bahtev. Ĉe laborista klubo „Leftenanto Smidi“ estas organizata dua grupo. La unua grupo komencis praktike lerni la lingvon. Gvidas k-do Bezilo Averin. La kvara rondeto organiziĝas ĉe lernejo „Politehnikum“. Gvidas k-do Paramanov. La kvina rondeto organiziĝis ĉe tramoficejo. Gvidas k-do N. Stepanov. La 25. 11. okazis ĝenerala kunveno de geesperantistoj, en Astrahanj. Estas intencata malfermo de ekspozicio Esperantista ĉe laborista klubo „5. Oktobro“. La saman tagon vespere je la 4.15 h. oni aŭskultis radio-koncerton el Moskvo.

Kiev. Ĉe Politeknika kaj Agronomia Institutoj, dank' al ĝenerala s-o P. Poniševskij estas organizita „Esperanto-

Sekcio“. Ĝi konsistas el rondetoj: literatura, drama, arta kaj eldonista. Funkcias ankaŭ malfermitaj kursoj de la lingvo. Oni aranĝas bibliotekojn kaj ekspoziciojn; kunlaboras lokaj gazetoj kaj ĵurnaloj, en kiuj estas malfermitaj fakoj por Esp. La 27. 10. Prof. V. N. Devjatnin faris raporton „Historio kaj disvolvigo de internacia lingvo kaj ĝia signifo por la proletario“. La laboro estas malhelpita per ano de ludo, kiuj la pasintan jaron jam interesis grandan parton de la studentaro.

En Kiev ankaŭ bone funkcias „Regnaj Kursoj de la internacia lingvo“ ĉe Gubprofbz (Gubernia Komitato de profesia kaj teknika klerizado). Odessa. La 30. okt. en la ĉefstacidomo de la stacio k-do Lingel iralegis lekciojn „Pri la deveno de Esperanto ĝia signifo, evoluo kaj disvastiĝo en Rusujo kaj eksterlande“. Ĉeestis ĉirkaŭ 800 geofletoj-fervojoj. — La 9. nov. en tiu sama loko komenciĝis kurso kun 45 lernantoj, kiun gvidas k-do Lingel.

## Gazetaro.

Die Gleichheit, Wiener Neustadt, Aŭstrio, 21. 9. Pri Esp kaj laboristoj. St. Catharicus Blätter, Wien, n-o 14, nov., Pri alkohol-konsumo el ET. Christl. Soziale Arbeiterzeitung, Wien, 21. 9. Esp. kaj L. d. N. La Meuse, Liège, 19. 11. Kontraŭ Esp. A Ideo, Ceara, Brazilio, 13. 10. Art. pri Esperantisto P. R. F. de Cunha. La Caravane, Gaillac sur Tarn, Francujo, nov. Malgranda kurso de Esp. Armée Nouvelle, monata gazeto de milit-pensuloj, Paris, 16. 11. Esp. kaj L. d. N. L'Index, Paris, nov. Interesa art. en Esperanto pri plando-ledo en Francujo. Foir-Gazeto Le Lézic kun aldonoj, 25. 11. Agrupacion Escultista, Barcelona, okt. Eugenia, Barcelona, nov. Gleaner, Kingstown, Jamaiko 4. 8. Esp. kaj L. d. N. Norod, Split, Jugosl. 25. 11., 4. 12. Kun div. notoj pri Esp. en spec. fabriko. Het Vaderland, Hago, 8. 12. Anonco pri Esp. Radio-Wereld, Amsterdam, 16. 11. Bonega artikolo pri E. kaj radio de H. A. Epton. Republika, Lodz, 27. 11. Trad. el ET. New Jersey Post, Town of Union, 10. 11. Art. pri Esp.-festo de Esp. Societo de New York.

## Scienco.

### Antikveco de l' homo vivo.

La ĝisnunaj hipotezoj pri antikveco de l' homo vivo estas nun refutitaj de konata antropologo Wolf, sukcesinta trovi en Patagonio kranion de l' homo, vivinta dum terciara epoko. Laŭ opinio de l' fama profesoro de Kolumbia Universitato Frantz Boas, la trovitaĵo estas je 500000 jaroj pli antikva, ol la fimekonata kranio, siatempe trovita sur insulo Java. Ĉar la lesta, laŭ opinioj de l' sciencistoj, estas ĉ. 500000-jara, oni do povas konkludi, ke pasis jam pli ol miliono da jaroj de la apero de la unua homo sur la terglobo; alivorte la homo, kies kranio nun estas trovita, estis vivanta en la epoko, kiam la polusaj regionoj ankoraŭ havis tropikan klimaton.

Laŭ gazeto „Nakannue“

R. Lorentson, Reval, Estonio.

### La terpomo.

La terpomo, kiu en la 16-a jarcento elmigris el Sudamerko Eŭropon — faris brillan karieron, kvankam ĝiaj komencoj estis iom malfacilaj.

La terpomojn oni ekplantis unue en Hispanujo kaj nur en fino de 18-a jarcento oni sukcesis aklimatigi ilin en Francujo, kie la kuirarto longe sin defendis kontraŭ tiuj noveĵoj.

Nun la statistikoj elmontras, ke la plej granda kvanton da terpomoj produktas Polujo, kie elfalas 1.575 kilogramoj je ĉiu loĝanto. Polujon sekvas Irlando kun 800 kg. kaj la trian lokon okupas Kanado, produktanta meznombro 490 kg. je unu loĝanto.

W. P.

## Mineralogio.

### La nigra Opalo.

Unu el la plej maloftaj juvelŝtonoj estas sendube la nigra opalo, trovata en Aŭstralio. Oni trovis ĝin en malgrandaj kvantoj en tavoloj de sabioŝtono kaj fer-minaĵoj de l' ŝtato New South Wales. De post 1890 oni trovis nigran opalon en proksimuma valoro de 12 milionoj da dolaroj. Ankaŭ en Queensland oni trovas ĝin, kvankam en malpli grandaj kvantoj. Aŭstralio cetere estas tre riĉa pri juvel-mineraloj. Rubenojn, smaragdojn, afirojn, turkisojn, ametistojn, topaziojn, turmalinojn, marbluajn smeraldojn ktp. oni trovas ĉefe en la argila grundo de la aŭstraliaj river-fluejoj. Precipe la aŭstraliaj safiroj montras eksterordinaran brilegon. Ili bluo estas malpli hela ol tiu de la orientlandaj safiroj. Oni ankaŭ trovas diamantojn en Sudaŭstralio kaj en New South Wales. Ili estas malpli grandaj ol tiuj de Sudafriko kaj ĉefe uzataj por akrigado, borado kaj tranĉo de vitro. Je la norda marbordo de Aŭstralio oni trovas ankaŭ perlojn. Ili tamen estas malgrandaj kaj pro tio malpli valoraj.

## Arkeologio.

### Amerikaj trovoj en la dezerto Gobi.

Per helpo de amerikaj milionuloj antaŭ ne longe okazis esplor-viaĝo al Mongolio laŭ iniciato de Profesoro Osborn, granda aŭtoritato pri fosilaj mambestoj kaj reptilioj. Osborn atentigita jam de longe pri la simileco de la bestospecoj en la nova kaj malnova mondo opinis, ke oni devus trovi komunan devenocentron ie en la albeŝoj de nordorienta Azio. Aŭtomobiloj kaj kameloj grave helpis al la transportado de la ekspedicio. Ĝi konsistis el ok amerikanoj inkluzive unu paleontologo kaj unu topografo. Forlasante Pekin ili eniris en la teritorio de la dezerto. La korekto de la teorio de Osborn brile konfirmiĝis. Oni trovis proksimume 70 kraniojn kaj 12 skletonojn kompletajn de dinosaŭrioj kune kun multenombraj ovoĵoj. Ĉar oni ĝis nun ne scias, ĉu tiuj bestoj naskiĝis vivantaj idojn aŭ metis ovojn kiel la modernaj reptilioj, ankaŭ tiu ĉi punkto povis esti klarigata. En krevita ovo oni vidis interne de la ŝtoniĝo tre klare la embrion de l' besto, blanke sur ruĝeta ŝtonfundo. Kompreneble la rezultoj ne jam estas ĉiuj klasigitaj. Tio daŭros ankoraŭ certan tempon.

En la sekundara epoko la reptilioj regis la akvon kaj la aeron, konformigitaj al ĉiuj elementoj. Kiel dinosaŭrioj ili havis la grandeco de elefanto aŭ la longeco de baleno ĝis tiu de kokin-ovo, kelkaj moviĝis sur kvar piedoj, aliaj duonekte, simile al la makropo. La plej multaj el ili estis plantaĵo-manĝantoj Teruraj devas esti finitaj la grandaj viando-manĝantoj kiel la megalosaŭrioj. En la sekundara epoko ne jam ekzistis altevaluj mambestoj kiel raportas Prof. Boyd Dawkins. Kiam da tempo tamen pasis de tiam, kaj kiom da tempo estas inter la formorto de la dinosaŭrioj kaj la apero de mambestoj en la terciara epoko oni ne kapablas esprimi per la homa tempokalkulo.

## Geografio.

### La evoluo de Orienta Afriko.

La guberniestroj de Ugando (Brita Orienta Afriko) kaj de Kenjo (antaŭe germana orienta Afriko) postulis de la angla kolonia ministerio prunteprenon de 6 milionoj da anglaj funtoj por la konstruo de fervojoj kaj havenoj. Oni intencas konstrui novajn fervojojn-liniojn de proksimume

## Progresoj de la radio-tekniko.

De Ing. V. J. Bajenov.

El rusa lingvo tradukita de A. Hajkis.

II.

La radiotelegrafo en aĉverturado trovis interesan utiligon — kiel rimedo por orientiĝi nokte, en nuboj, dum flugoj super la nekonaata loko ktp., kiam oni atingas per helpo de du radiostacioj, troviĝantaj sur la iero. Ekzemploj de utiligo de radiotelegrafo en la aviado estas tro multaj, por ke oni povu elĉerpante prirekliti ilin tie ĉi. Sufiĉos montri, ke Usono unue elkondukinta ĉe si la leĝon pri la deviga por ĉiuj komercaj ŝipoj provizo je radiostacioj, elaboris similan leĝon por ĉiuj komercaj aeroplanoj kaj aerŝipoj, kaj por la grandaj tiuj de tiuj ĉi maŝinoj estas deviga ne nur radiotelegrafo, sed ankaŭ radiotelefono kaj la ilo por difini la direkton — radiokompaso.

La radiotelegrafo por la komunikoj je granda distanco tiom evoluis en teknika kaj ekspluatita rilato, ke ĝi fariĝis jam grava konkurento de la drata telegrafo. En Anglujo jam en 1920 la firmao Marconi aranĝis radiotelegrafan komunikojn kun Aŭstralio je la prezo de 2 ŝilingoj po vorto, anstataŭ ŝilingoj je la kablo; kaj la sciigoj el Germanujo de nunjara februaro montras, ke en unu el la germanaj stacioj la kosto de transsendo de vorto per radiotelegrafo estas kvinoble malplilkosta ol la transsendo de la sama vorto per drato.

Ofte la facileco de utiligo kaj la oportuneco, prezentata de la radiotelefono, tiom superas la samejn ecojn de la radiotelegrafo (sufiĉas por tiu ĉi komparo nur rememori la lokon, kiun okupas en la nuntempa vivo la drata telegrafo kaj telefono), ke ne estas necese servi specialajn katzojn por klarigi tiujn ĉiam novajn kaj novajn utiligojn de radiotelefono, pri kiuj alportas al ni sciigojn preskaŭ ĉiusemajne la eksterlandaj fakaj gazetoj.

Estas necese speciale atentigi pri la venko de progreso: nun per helpo de la radiotelefono oni sukcesis transdoni parolon trans oceano: la drata telefonio tra la oceana kablo estas ĝis nun konsiderata kiel nebla, kaŭze de grandegaj teknikaj malfacilaĵoj.

Ĝi en flinujo la firmao Marconi konstruis en 1920 kaj 1921 ducent da radiotelefonaj stacioj kaj jam en marto 1921 la korespondantoj de rusaj gazetoj en Harbin kaj Ĉita aŭdis en tiel rusaj radiostacioj la radioparolon el Pekin (parte en rusa lingvo), post kiu estis same bone aŭdeble aĉdatataj en la Pekina radiostacio diversaj muzikaj fragmentoj.

Kaj estas tute nature, ke dum pri la progresigo de la evoluo pri la plibonigo de ekspluatita kondiĉoj de radiotelegrafo estas okupitaj ĉefe la registaraj institucioj kaj grandaj firmaoj de diversaj ŝtatoj — la perfektigoj en la regiono de la radiotelefono (transirinta el la fazo de laboratoriaj esploroj kaj okazaj, rekordaj sukcesoj en ŝtato de forta praktika bazo apenaŭ nur antaŭ tri jaroj) estas farataj ĉefe de la vasta areo de amatoroj amerikaj kaj anglaj aĉdatataj de la firmaoj apartajn ilojn, kaj ligitajn ilin en ĉiuj eblaj manieroj por atingi la plej bonajn rezultojn.

Kaj efektive, malfacile estas nomi la regionon en kiu la radiotelefono (ni diru arkuraŭ ne taŭga por transiri tre grandajn distancojn) ne estas lasinta siajn profundajn radikojn. Krom la komunikigo, kiu fariĝis ordinara dank' al la „katodaj lampoj“ — kaj ĉiuj atingitaj sukcesoj de radiotelefono preskaŭ tie venas de tiuj lampoj — la amerikaj kaj okcident-eŭropaj radioelektrikaj konvenas vaste uzi la radiotelefonon por interspaca sendata transdono de muziko kaj kanto.

Tiel ekzemple, la okcident-eŭropaj amatoroj havas la eblon jaŭde kaj dimancne ne nur aŭdi mem, sed ankaŭ per helpo de laŭte parolantaj aparatoj similiaj al tiuj, kiuj estis starigitaj sur Moskvaj placoj) transdoni al negranda aŭdantaro koncertojn, radiotelefonajn el unu el la holandaj radiostacioj. En Idore-parko, en Kalifornio estas starigita radiotubo, plengiganta per sonoj de radiokonzertoj la areon de 29 kv. mejloj.

La amatoraj ricevantaj stacioj ebligas aŭdi koncertojn al terkulturistoj dum lia laboro, al fŝkaplistoj, kiam ili estas sur maro dum kaptado ktp., en la amerikaj amatoraj gazetoj komence de 1922 estas ankondukita speciala paĝo „Hodiaŭ en aero“: diversaj firmaoj sciigas al personoj aĉetintaj radiostaciojn de certaj fabrikoj, ke la posedantoj de la stacioj povas aŭdi la plej diversan programon: de la 10-a horo matene ĝis la 12-a nokte ekzemple: de la 8-a ĝis 9-a h. vespere „Homo el la luno“ — rakonto por

infanoj, de la 8-a ĝis 9 koncerto (kantado), de la 9-a ĝis 10 a horo opero ktp. La lastaj „radioprogramoj“, ricevataj el Ameriko, montras ke la etero fariĝas iom malvarma: la firmaoj utiligas la eteron jam de la 7-a horo matene (po kvaronhoro kaj po duonhoro por ĉiu aparta numero de programo).

En Ameriko jam en 1920 tiuj koncertoj (transsendo de kanto, muziko, opero) estis kutima afero — la farmistoj aŭskultas tiajn koncertojn „dum laboro“. En la paŭzoj dum koncertaj numeroj kaj bulnetoj pri vetero, rikolto, borso ktp. la firmaoj, organizantaj tiajn staciojn reklamigas sin kaj aliajn firmaojn kaj per tiu fonto de enspezo kovras la elspezojn por subteno de la stacioj. La nombro de tiuj stacioj en Ameriko dum 2 monatoj kreskis de 67 ĝis 274.

En kelkaj Usonaj ŝtatoj la lokaj centroj donas por la tuta regiono ĉiutage radiotelefonojn, en kiu oni komunikas la foirajn prezinojn por la pasinta tago, la sciigojn pri la vetero ktp. La radiotelefonaj stacioj estas starigitaj de la arbara departemento de Usono en diversaj arbaraj postenoj kiel bonega ilo por tuj informi centron pri la komencinta arbara brulo ktp.

En la regiono socia-politika radiaĵo donas eblon al grandega nombro da homoj, troviĝantaj en diversaj lokoj de la lando, samtempe aŭdi parolojn de paroladistoj en senato, prelegojn de profesoroj ktp.

En Ameriko preskaŭ en ĉiuj lernejoj estas starigitaj radiotelefonoj kun laŭte parolanta aparato. La scipova pedagogo larĝe uzas tian aparaton kaj procedon de la ricevo de radiotelefonoj kiel radiotelegrafajn por ilustri la instrudaron de la fundamentoj de matematika, fiziko, geografio, fremdaj lingvoj ktp. Kaj antaŭ nelonge en la urbo Shenectady (Usono) unu eltrovema firmao montris novan utiligon de radiotelefono — la akceptan stacion sub ordinara infana veturilo kun laŭte parolanta tubo, aranĝinta ŝiel, ke la infano kaj ĝiaj akompanantoj dum la promeno sur la urbaj stratoj povas libere aŭdi la kanton kaj muzikon de la potenca radiotelefono elsenda stacio, sin trovanta en kelkaj centoj da kilometroj de Shenectady. Oni povus multe rakonti pri diversaj formoj de ĉiutage utiligo de radiotelegrafon ricevantaj radiostacioj, por kiuj kiel anteno servas metalaj partoj de ordinara ombrello, kaj kiel alerigo la boto de la amatoro; radiostacioj kies ĉiuj ricevantaj partoj troviĝas en virina ŝtrumpofiksilo (al la orelo iras nur la drato kun telefono) ktp.

(Daŭrigo sekvas.)

300 mejloj da longeco, plifortikigi la surkonstruaĵojn de la fervoja linio Mombasa-Nairobi por ebligi pli forian trafikon. Krome oni celas plilongigi la nun de Mombasa elrontan fervojon ĝis Džinda je la elfluo de l' Nilo el la lago Victoria Njansa, do je proksimume 100 mejloj okcidenten. Tiamaniere ekzistus seninterrompa kunligo inter la maro kaj la lagoj.

## Aktuala politiko.

### La riparpagoj de Germanujo.

Konata sciencisto Profesoro Lujo Breniano en München publikigis resumon pri la riparpagoj de Germanujo ĝis fino de l' jaro 1922. Kion laŭ li pagis Germanujo ĝis nun, montras la sekvanta listo:

#### a) Riparpagoj.

Monpagoj	1780016456
Karboj kaj koalkoj	2424000000
Karbo-subproduktoj	45000000
Farmmaterioj kaj farmaciaj artikoloj	200000000
Bestoj	274000000
Agrikulturaj maŝinoj	31040000
Liveroj por rekonsruo	290686794
Rekonsruo de la Universitato de Louvain	15788585
Mar- kaj riversipoj	4755441068
Fervoja materialo	1928157774
Sarĝ aŭtomobiloj	115675855
Vendita milit-materialo (Enspezoj por uzita materialo)	200000000
Angla ripar-kvotaĵo	163160182
Nemilitaria postlasintaĵo je la okcidenta fronto	1891150387
Privat-kabloj	77800000
Forliveritaj biloj	392642671
Saar-minejoj	1017126890
Cedita regna kaj ŝtata posedaĵo	5052106052
Partiopreno al la regna kaj ŝtata suldo	644414415
Ceditaj suldpretendoj	8600000000
Likvidota germana privat-posedaĵo en eksterlando	1174000000
	41612555107

#### b) Aliaj pagoj nekalkulataj je konto de riparoj laŭ la kontraktado de Versailles.

Ŝtataj kabloj	1609744
Regna kaj ŝtata posedaĵo en Eupen-Malmedy	150000000
Reparoj grandaj kaj malgrandaj	446250000
Kostoj de la okupacio	895000000
Kostoj de la interaliancanaj komisionoj	94000000
Fordomitaj militŝipoj	1417000000
Nemilitaria postlasintaĵo je la orienta fronto	1050000000
Militista kaj industria malkonstruado	895000000
Pagoj elblancigaj	615000000
Diversaj aboj	685895000
	14304784744

entute 55917309851 ormarkoj.

La statistiko enhavas sole la rektajn pagojn.

## Agrikulturo.

### La stato de semajoj en Polujo.

La Ĉefa Statistika Oficejo en Warszawa komunikas sekvantajn detalojn pri la stato de semajoj en oktobro 1923:

La stato de vintroj semajoj estas ĉie bona kaj laŭ la kvalitaj gradoj prezentiĝas en tuta Polujo sekvanter: por tritiko 5,7, por sekalo 5,8, por hordeo 5,8, por kolzo 5,7, por trifolio 5,6. Plej bona estas la stato en departementoj de Volinio (tritiko 4,2 kaj sekalo 4,5) kaj de Tarnopol (tritiko 4,2 kaj sekalo 4,2), tamen ankaŭ la aliaj departementoj, kun nemultaj esceptoj, notas la staton super 5,6 (5 — stato bonega, 4 — bona, 3 — mezbona, 2 — nesufiĉa, 1 — malbona).

W. P.

## Internacia sporto.

### Piedpilko.

#### Bulgarujo.

Sportklubo „Levski“ ludis kontraŭ sportklubo Tica-Varna en Sofia. Rezulto 2:2.  
Sportklubo A. C. 25 kontraŭ „Sokol“ en Sofia venkis 4:0.

#### Ĉeĥa piedpilko-ludo.

Trimonata rondvojaĝo de „Sparta“ (majstra klubo de Ĉeĥoslovakio) tra Hispanio, Portugalio kaj suda Ameriko okazos per helpo de ŝtata piedpilka unio en Argentino kaj la eminentaj sparta-anoj. Ili forveturos je Kristnasko. Oni ludos en Barcelona, Madrid, Lisboa, poste en Buenos Aires, Rio de Janeiro kaj Montevideo. Ili revenos al Praha je fino de marto. La delegito de argentina unio, kiu partoprenis la lukton Sparta-Slavia en Praha (Slavia estas unu el la plej bonaj kluboj) promesas grandajn sukcesojn en Ameriko.

En la lasta tempo estas plej multenombro vizititaj en Praha la piedpilkaĵ bataloj, precipe kiam la eminentaj kluboj alportas informojn pri

## Por la fak-rubrikoj

de nia gazeto  
ni daure bezonas  
ĉiam aktualan  
materialon!

Sendu ĝin tuj al la redakcio Horrem b. Köln.

ia bona eksterlanda lukto. Aliaj sportistaj okazoj ne estas tiel bone vizititaj. Plej multe interesas krom piedpilko la atletiko, pli malmulte la boksendo ktp.

## Al niaj legantoj.

Depos kvar jaroj jam regas malfavoraj cirkonstancoj en Germanujo. Al niaj laboroj kontraŭstarigis tre konsiderindaj malfacilaĵoj. Sed feliĉe ni ĉiam sukcesis forigi ilin per obstina laborego. El iama revo farigis realaĵo... ET regule aperanta ĉiusemajne kun ampleksa enhavo kaj interesindaj aldonoj, ŝatata de arego da gesamideanoj en la tuta mondo, nepre necesa al ĉiu aktiva propagandisto por nia afero.

Nia revo ne jam plene efektiviĝis. Sed ankaŭ la malfacilaĵoj ne jam malaperis. Kontraŭe. Denove pligravigas la situacio en Germanujo kaj plej akre en la regiono, kie troviĝas nia sidejo. Denove grandega krizo — eble la plej granda — ekskuigas la fundamenton de nia modesta entrepreno. Kaj denove ni fidas al nia obstina laboro. Sed ĝi sole evidente ne sufiĉas por feliĉe gvidi la ŝipon preter la rifoj. Ni bezonas la realan helpon de ĉiuj aktivaj gesamideanoj.

Pro tio ni alvokas ĉiujn, ke ili helpu al ni per daŭra abono, per rekomendo al aliaj gesamideanoj, per kolekto de abonoj por la nepre necesega pligrandigo de nia abonataro, per anoncoj por ET kaj por la komerca aldono. Nur se ĉiuj faktoroj kune efikas, ni povas sukcesi. Grandegaj estas la espezoj, malgranda nia kapitala forto. Nepre necesaj rezervoj mankas, eĉ por plibonigo de nia laboro. Dume la plikariĝo kreskegas, superas la mondmerkatan bazon kaj minacas nian ekziston.

Malapero de nia gazeto egalvalorus malsukceson de nia ideo, gripensu tion, estimataj gesamideanoj, kaj vi sciios, kion fari estas necesa.

Se vi okaze de la naskiĝ-tago de nia majstro renovigas vian promeson, diligente kaj senĉese verbari por nia afero, ne forgesu ankaŭ nian entreprenon, modesta, sed nepre necesa kaj esperiga ero inter la fortoj kunagantaj por la progreso de Esperanto. Ne fariĝu malfidelaĵ al ni, se superaj fortoj dumtempe ne ebligas al ni realigi ĉion, kion ni promesis kaj mem sincere deziras fari. Konsideru, ke vigla spirito kaj diligentaj manoj tagon post tago laboras por atingi la altan celon. Akcelu ilian klopodadon per reala subteno. Ne estu malgrandanimaj. Vi ja deziras la venkon de nia ideo. Por atingi ĝin, grandaj rimedoj estas necesaj. Ne forgesu tion!

Eldonejo kaj Redakcio de ET.

## Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enprezentaĵaj ĉiaj scigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen en prenas sur sin unu respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

### 241. Neksta.

Rilatas al 255.

Ankaŭ en itala lingvo oni diras *nel prossimo numero, la prossima settimana, il prossimo mese, anno, secolo* kaj mi miras ke oni povas ŝati galicismon: en la proksima. Laŭ mi tia esprimo estas tre klara kaj neksta ankaŭ pro la Esperante grafo ŝajnas esti stranga sonaĵaĵo. Oni ne devas komplicki nian lingvon per malinteraciaĵoj; oni devas gardi la veran fundamenton sanktitan de la 15-a regulo, se oni ne volas deturni Esperanton de sia celo.

J. Meazzini, L. K.

### 242. Neksta.

Ril. al 255.

Mi ne scias kial s-o Minor tiel insiste nin certigas pri nepre neceso de la vorto „neksta“; ĝi tute ne estas necesa. Serbo-kroata lingvo cetere ankaŭ ne posedas tiun esprimon, kaj tamen oni ne sentas ĝian mankon. Ĉu ne estas tute bone diri „en la sekvanta numero“. Neniu komprenos, ke tiu esprimo koncernas unu el la sekvantaj numeroj, sed precipe tiun, kiu aperos post la lasta, jam aperinta. Same tiel „la sekvanta tagon“. Ni ĉiuj devas insisti, ke la lingvo ne estu ŝargata per superfluaĵ vortoj, ĉar tiamaniere ni malhelpos, ke Esperanto estos facile kaj rapide elternebla.

Br. Rajšic, Zemun.

### 245. Rilatas al 227 kaj 255.

Kvankam mi ne volas plidubigi senutile la diskutadon pri la malfrate proponita rediko Nekst, mi deziras atentigi la Esperantistaron pri kelkaj malĝustaj ĝeneralaj argumentoj kaj erarigaj rezonmanieroj, kiuj estas neakceptindaj:

1. Oni estas malprava, asertante, ke radiko, kiu apartenas nur al du *samfamiliaj* lingvoj, estas „sufiĉe konata por esti komprenebla“. Iu radiko povas esti rigardata kiel sufiĉe internacia nur se ĝi apartenas samtempe almenaŭ al du *malsamfamiliaj* lingvoj.

2. Oni estas malprava asertante, ke la uzado de la radiko Proksim en tempa senco estas „malkorekta idiotismo“ speciala nur al unu lingvo. Efektive, esceptante la rusan lingvon, ĉiuj precipe eŭropaj lingvoj, eĉ la sveda kaj la finna uzas ankaŭ en tempa senco la vortojn, kiuj signifas lokan proksimecon. Tia transiro el la spaco al la tempa signifo estas cetere tute konforma al la psikologiaj leĝoj kaj al la logiko.

3. Oni estas malprava, asertante tro rapide, ke la taŭga vorto aŭ esprimo mankas al Esperanto, antaŭ ol esti tute certa, ke oni sufiĉe estas informita kaj ke oni plene konas la ekzistantajn rimedojn kaj la vivantan uzadon de nia lingvo. Kelkaj Esperantistoj ja tro similas tiun bonfarenan homon, pri kiu la antikva romana filozofa Seneko parolas, kiu tiom amis siajn amikojn, ke li fervore deziris, ke ili dionu, por ke li havu la plezuron savi ilin. Same tiuj bonintencaj sinjoroj tiom amas Esperanton, ke ili deziras, ke ĝi estu ja malkorekta, malregula, mankoplena kaj malperfekta, por ke li havu la honoron triumfe korekti, reguligi, pleniĝi kaj perfektigi ĝin. Tiajn korektojn kaj perfektigojn, kiuj estas en efektiveco nur arbitraj fantaziadoj, eĉ bezonacoj, rigidigoj, plikomplikigoj kaj troblastigoj, ne bezonas nia lingvo. Anstataŭ perdi nian tempon rebonigante mal-

bonaĵojn, kiuj ekzistas nur en nia nesufiĉe scianta fantazio, ni farus multe pli utilan laboron praktike kaj propagandante la Zamenhofan lingvon. Prof. E. Grosjean-Maupin.

244. Neksta.  
Ril. al 227 kaj 255.

Pluraj el niaj abonantoj tre prave skribas al ni, ke la noto de s-o Minor enhavas fundamentan eraron. La aludita radiko en angla kaj en germana lingvoj estas superlativo kaj estas tre simple tradukebla per la superlativo „plej proksima“ sed ne povas esti tradukata per unu simpla vorto, ĉar Fundamenta Regulo postulas, ke ĉiuj superlativoj estu formataj per aldono de la vorteto „plej“ kaj estu sekve du-vortaj.

Ĉiuj argumentoj do pravas la superfluecon kaj eĉ nekorektecon de „neksta“ kaj post tiu ĉi konstato ni finas tiun ĉi interesan diskutadon.

La Redakcio.

## Bibliografio.

### Libroj.

Cavalleria Rusticana (Kamparana Kavaliro aŭ Vilaĝa honoro). Dramo en unu akto de Giovanni Verga (1840—1892). Tradukis el la itala lingvo Rodolfo Castagnino kun gentilia permeso de la heredinto de la aŭtoro. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italio) 1923. 12:17 cm. 48 pg. Prezo: 1 svvis fl.

Oni ne troigas, dirante ke ĉi tiu dramo estas mondkonata. Kiu ne konas la ĉarmajn, ravajn melodiojn de la Mascagnia opero samnoma? Ĝi estas tipe itala teatraĵo, pasiplena, emociiga kaj kortusa. Ne plu estas necese paroli pri la enhavo. La tradukinto plejble imitis la sudlandan parolmanieron de la originalo. Presearajno mi ne trovis. Menciindaj estas la formoj Jesuo anstataŭ jezuo (definitive oficialigita de la Akademio kaj L. K.), kaj dekdek anstataŭ dek ok. Strangulo estas ankaŭ „tiel mi ankaŭ fesi Parkon“; evidente mankas verbo „deziras“ aŭ volas. — Sendube la Esperantigita verko estas gajno por nia internacia teatro-literaturo. G. Ajul.

### Gazetoj.

Brazila Esperantisto, jun-sept.  
La Semisto, Sabadell, jun-okt., n-o 54. Pri Nürnberg.  
La Revuo Orienta, n o 8, 10, 8.; n-o 9, 25, 8.; n-o 10, 20, 10.  
Kun interesaj raportoj kaj bildoj pri la terura tertremo en Japanujo.

Konkordo, Zagreb, aŭg.  
Belga Esperantisto, Antwerpen, sept-okt.  
Katolika Mondo, Graz, n-oj 6-7, okt-nov.  
Esperantista Junularo, Baugé (Franc), sept-okt.  
Hungara Esperantisto, n-o 10-12, okt-dec.  
La Progreso, Praha, nov. Konsiderinde ampleksigita.  
Litova Selo, Kaunas, nov.  
Itala Esperanta Revuo, San Vito al Tagliamento, okt. kaj nov.  
Bulgara Esperantisto, Sofia, nov.  
The British Esperantist, nov.  
Marto, Haida, 20. 11.  
Informoj de Esp. Asocio de Estonio Nova presita organo de estoniaj Esp-istoj, nur interna organo, ĝis nun hektografita.

Vegetarano, Hamburg-Fuhlsbüttel, okt.  
La Lumturo, 1. 11.  
Der Arbeiter Esperantist, Breslau, nov.-dec.  
Esperanta Ligilo, Stockholm, dec.  
Germana Esperantisto, Berlin, nov.  
Arguso, Mexiko, nov.-dec. Tre interesa kaj leginda gazeto de samideanoj en Meksiko kun historiaĵoj ktp.  
Literatura Mondo, Budapest, nov. Ĉiam interesa kaj leginda.  
Sennacieca Revuo (kun lit. Scienca aldono), Paris, dec.  
Novaj Tempoj, dec.  
Holanda Esperantisto, n-oj 98, 99, 100.

## Al la hodiaŭa numero estas aldonita la decembra „Internacia Komerc“.

## Ĉu vi amas arton kaj literaturon

? ? ?

Abonu tuj la revuon

### „Literatura Mondo“

Andrassy út. 81 :-: Budapest VI.

★

La malnovaj abonantoj estas petataj renovigi siajn abonojn.

# ARGUSO

Dumonata Revuo.  
Organo de Meksikaj Esperantistoj.

Hispane kaj Esperante redaktata. Scigoj pri la landa kaj eksterlanda movado. Interesaj artikoloj pri „Meksiklando“, rakontoj ktp.

Jara abono 1.00 dol. Provonumero kontraŭ resp.-kup.

Por ĉiuj detaloj turnu vin al la eldonanto:

## M.C.Rodriguez, Mexiko D.F.

Apdo. 2482.

Rava donaco! Baldaŭ aperos!

# REGŌ LEAR

la majesta, belega ĉefverko de *Shakespeare*.  
Tradukita de Pastroj  
A. L. Curry, M. A., F. B. E. A. kaj A. J. Ashley.  
Aĉetebla ĉe  
Pastro Ashley, The Vicarage, Farnley Tyas,  
apud Huddersfield, Anglujo.  
Afrankaj prezoi:  
Fortike bindita (toldorso), numerita kaj sub-  
skribita de la tradukinto (nur 2-0 ekz.) 4\$ 6p.;  
sen subskribo, 3\$ 6p.; kartonbroŝurita 2\$ 6p.

# Koncerta Kantaro.

Simplaj kantoj kun facila akompano de fortepiano.

Eldonita de P. C. Brederode kaj K. Veldkamp; tradukinto de la tekstoj Jan Ziermans.

1-a parto.

holandaj guldenoj: broŝurita 2.50, bindita 5.50.  
svisaj frankoj: broŝurita 5.—, bindita 7.—.

Eldonejo:  
P. Noordhoff, Groningen, Holando.

Jus aperis

# 'La Reĝo Judea'

Dramo en 4 aktoj kaj 5 bildoj. El rusa lingvo tradukis V. Devjatjin. Esperantan tekston trarigadis magistro de teologio kaj akademiano prof. A. Dombrovski. — Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. Dua eldono, 182 paĝ. 13x18 cm. Prezo broŝ. 2.25 sv. fk. bind. 2.75 sv. fk. plus 0.50 sv. fk. sendkostoj. Por revendistoj rabato.

... „La Reĝo Judea“ estas verkita de anonima, tamen rekonata, eminenta rusa poeto, sin kaŝanta sub literaj „K. R.“ La verko estis ludita en Rusujo, en la imperiestraj teatroj antaŭmultaj. — Ĝi estis tradukita en sep lingvoj: — La eldono, presita en Dresdeno (Wihl. Limperi) havas elegantan eksteron kaj estas sen preseraroj ...

Menu de la eldoninto

## P. Medem, Kaunas

Smelnu g. 12 (Litov.)

Esperantista Centra Librejo

51, rue de Clichy, Paris.

Eldonejo de la

# Verkoj de D-ro L. L. Zamenhof

kiujn ĉiu Esperantisto devas legi.

- Ĉefaj verkoj aĉeteblaj:
- Fundamenta Krestomatio, entenanta la „Ekzerco“ (el la „Fundamento de Esperanto“), „Fabeloj kaj Rakontoj“, „Artikoloj pri Esperanto“, „Poezioj“. Unu dika libro 460-paĝa . . . Franc. Frankoj 8.—
  - Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière. Unu libro grandformata . . . 5.—
  - Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare. Unu libro mezformata . . . 3.—
  - Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe. Unu libro grandformata . . . 6.—
  - Proverbaro Esperanta, laŭ la verko „Frazologio rusa-pola-franca-germana“ de M. F. Zamenhof (1252 proverboj). Unu libro grandformata . . . 3.—
  - La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller. Unu libro grandformata . . . 4.—
  - La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol. Unu libro grandformata . . . 4.—
  - Fabeloj de Andersen. Plena kolekto. Unua libro grandformata . . . 6.—
  - La Rabeno de Bahara, romano de H. Heine. La Gimnaziano, monologo de Salom Alaihem. Unu libro grandformata . . . 3.—
- Verkoj baldaŭ aperontaj aŭ reaperontaj:
- Maria, rakontoj de Eliza Orzeszko. Unu libro grandformata . . . 3.—
  - Lingvaj Respondoj aperintaj en „La Revuo“. Unu libro grandformata . . . 4.—
- Oni aldonu al la prezo, plie por la sendkostoj: 150/10 + 0,25 fk. en Francujo; 200/10 + 0,75 fk. en aliaj landoj.
- Katalogo senpage sendata.

Ĉiu posedanto de Faŭsto nepre bezonas la koncizan

# Komentario al Faŭsto

verkita de Max Butin, L. K.  
Prezo: 50 sv. cent. plus sendkostoj.  
Eldonita kaj havebla ĉe

## Butin & Jung G.m.b.H. Godesberg

(Germanlando) Bahnhofstr. 30.  
Poŝtĉeka Konto: Köln 92056.

Jus aperis:

# AKBAR

Orienta romano de P. A. S. van Limburg Brouwer, tradukita de J. C. kaj J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans, rekomendata de Esperantista Literatura Asocio.

Prezo por bonvalutaj landoj 1.80 hol. guld. + afranko. Mendebila ĉe

## J. R. G. Isbrücker,

v. Beveringstraat 10,  
's-Gravenhage, Nederlando.

Fundamenta prezo por malbonvalutaj landoj 3,60 or-mk. Mendebila ĉe

## Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Wilms-Strasse 5,  
Berlin SW 61, Germanujo.

# Kristnasko alproksimiĝas!!

Donacu bonajn Esperantajn librojn!

Wisemann, Fabeloj	1.50
Seidel, Vintro-Fabeloj	1.50
Hebbel, Gyges kaj lia ringo	2.—
Ramo, En Svislando	2.50
Goethe, Hermano kaj Doroteo	1.20
Thulston, La urbo de belega sensencaĵo	2.—
Bulthuis, Mal ica en spirito	0.50
Bulthuis, Taglibro de Vilaĝpedelo	0.50
Oberrotman-Jung, La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	1.50
Rieck, Oni Ridas	0.50
BES-a Adresaro (por kolektantoj)	1.—

Ni liveras nur post antaŭa pago. Por afranko aldonu 10%.

## Butin & Jung, G. m. b. H.

Esperanto-Eldonejo,  
Godesberg (German.), Bahnhofstr. 30.  
Poŝtĉeka Konto Köln 92056.

# Anoncetoj.

FILATELISTOJ! Kontraŭ mondeporno mi vendas nur unuaklasajn pm. de ĉiuj landoj. Malnovgermanujo, Eŭropo Transmaro, Kolonioj, maloftejoj, novaĵoj ktp. je senkurencaj prezoi laŭ Vyeri-Tellier-katalogo. E. Gabelmann, Katharinenstr. 14, Freiburg i. Br. Germ. [2]

ESPERANTA MIGRANTA BIBLIOTEKO liveras al rusaj samideanoj plej abundan legmaterialeon. Petu informojn de s-o K. Kolobaŝkin, Volove — Livenskoje, gub. de Orel, 5 Lomigory, aŭ de s-o I. Sirjaev, Baklanka, gub. de Volodga. Por respondo nepre aldonu pm. [4]

KARAJ AMIKOJ! Mi estis vojaĝinta en Eŭropo kaj Afriko dum multaj monatoj. Mi translokiĝis al Paris. Mia nova adreso estas: Ilario Vásárhelyi, 50 rue de la Félicité, Paris 17e. Mi interŝanĝas pm. kaj pk. il. [2]

ATENTU! Du 20 jaraj lignaĵistoj serĉas okupadon en la eksterlando. Skribu al: Willi Lunz kaj Bruno Schlick, Nürnberg, Peter-Henleinstr. 30/4 Germanujo. [2]

RUSAJ GESAMIDEANOJ! Geparancoj de D-ro Vincas Pietaris (Vikenty Petter) mortinta 1902, en Ustinjna, Novgorod gub. serĉas lian familion, edzinon Marija Nikol. Petter kaj geinfan. Georgio, Adolfo, Vikentio, Antonio kun celo interkonatiĝi. — Ekscitante ion bonvolu skribi al Kl. Naudzius, Mariampolė, poŝtrestante, Litovio. [2]

GRAMOFONDISTOJ! Esperantajn deziras aĉeti Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo. [2]

KURACISTO, hebrea, mezaĝa, serĉas postenon, laŭeble hospitalan, eksterlande. Proponoj peras H. Wiitenberger, Del. de UEA, Anina/Banat, Rumanujo. [1]

KANADO. Mi deziras korespondi kun kanadaj Esperantistoj. J. B. E. de Koster, 98, Daltonstraat, den Haag, Holando. [1]

MI TRANSLOKIĜIS denove al Nederlando kaj devas peti miajn multnombrajn korespondantojn pri ioma pacieneco. Pro komprenebla troa okupo mi povos nur poste longe respondi al ĉiuj korespondantoj. Pastro R. W. F. Kyffienbelt, Amsterdam, antaŭe Del. UEA en Menado, Celebes, Nederl. Hind. [1]

GEFARMACISTOJ (geedzoj) serĉas eksterlande, laŭeble transmare, postenon. H. Wiitenberger, Anina/Banat, Rumanujo. [1]

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Alfonso Cappelini, Firenze 4, Italujo, Via (bfl.) S. Lucia 6, deziras korespondi per il. pk. (bfl.) kaj interŝanĝi pm. [2]

„Lab. Esp. Grupo“ serĉas por siaj membroj kaj lernantoj, gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Bonvolu skribi al: M. Schnitzler, Chaussée de Hensy, 78, Verviers, Belgujo. [2]

S-o C. J. v. Sonsbeck, Wingerdstraat 19, Utrecht, Nederlando, deziras interŝanĝi il. pk. kun naturvidindajoj kaj pm. [2]

Filatelistoj! S-o Kazimierz Liniowski, poŝtoficisto en Zolkiew, Lemberg, Polujo, deziras interŝanĝi pm. kaj donas tiajn de la Polujo, Danujo, Svedujo, kaj Litovio kontraŭ aliaj de ĉiuj landoj. [2]

S-o J. O. Saarinen, Forssa, Finlando, deziras korespondi kun ĉiuj landaj Esperantistoj. [2]

S-o A. Canninga, deziras ŝanĝi pm. kaj sportfotojn kun ĉiuj landoj. Adreso: Anjeliersstraat 12, den Haag, Nederlando. [2]

„La sportfota domo“ en den Haag, Nederlando, Daltonstraat 98, ŝanĝas sportfotojn kun ĉiuj landoj. Speciale korespondas kun Kanado kaj Albanio. [2]

Studentoj, atentul! — Esperanto-Sekcio ĉe Politeknika kaj Agronomia Instituto en Kiev (Rusujo) deziras korespondi kiel ajn kun lernantoj de la tuta mondo pri la vivo, organizaĵoj, sporto, aviado, tekniko ktp. Oni interŝanĝas. Korespondas Esperante, ruse, ukraine, germane, france, angle. Sendu ĉion laŭ adreso: Nazarjevskaja 19, loĝ. 2. [1]

Librotentanto Ernst Dröm, Stenslund 56, Falun, Svedujo, deziras korespondadon per il. pk. pm. paperrono ktp. kun la tuta mondo. [2]

S-o Pedro Juaréz Cano, stud. jur., Apartado 148, Santa Clara, Kubo, deziras korespondon kun gesamideanoj de la tuta mondo kaj interŝanĝon de pm., fotografajoj, pk. kun pm. bildflanke. [2]

Fraŭlo Johano Pogoreckis, 20 jara oficisto, Litovio, Panevezys, Marijos g. 82, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo kaj interŝanĝi per il. pk. pm., vidoj, fotografajoj, Esperantaj ktp. [2]

S-o M. Kuczarow kaj asocio, Studencka 55, Nieswiez, Polujo, deziras korespondi kun tuta mondo (precipe Grekujo, Bulgariujo, Norvegujo, Portugalujo, Turkujo) per il. pk., interŝanĝas pm. kaj paperronojn. Tuj respondoj. [2]

Pro multe da ricevita, korespondantoj estas maleble respondi al ĉiu Akceptu pro via afableco mian dankon! F-ino Helenjo Goldberger, Prešov, Ĉeĥoslovakio. [2]

S-o Josef Jaros, Praha-Prosek, 61, deziras korespondi per il. pk. l. k. e. l. Ciam respondas. [2]

S-o E. Neuhut, 1 Ulive Obecnio ovora 802, Praha, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun fraŭlinoj de la tuta mondo per il. pk. l. kaj interŝanĝon de pm. Ciam respondas. [2]

S-o Jules De Sloover, instruisto-studento, Ledeganckstraat 8, Gent, Belgujo, deziras korespondi per il. pk. kaj interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [1]

S-o Jos. De Graeve, Staatsnormalschool 8, Gent, Belgujo, deziras interŝanĝi il. pk. kaj paperronojn kun la tuta mondo. [1]

S-o Heinrich Schwarz, komercisto, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, petas japanajn samideanojn por alsendo de diversaj malgrandaj manlaboroj, bildoj ktp. precipe el Japanujo, rekomencotaj. [1]

S-o Otto Krickau, fraŭlo, Kirchsir. 16, Magdeburg, Germanujo, deziras korespondi kun Svedujo, Norvegujo, Finlando, Rusujo per il. pk. kaj l. Interŝanĝas paperronojn. [1]

Fervoraj gegrupanoj serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Korespondas per il. pk. kaj l. petas ankaŭ Esperantojn. Skribu al: S-o D. B. Albanov, Arkadsk. Saratovsk gub., Ruslando. [1]

Sendu monon, egalvaloro de hfl. 0.10 kaj vi ricevos paketon da belaj poŝtkartoj il. de Holando. Adreso: 98 Daltonstraat, den Haag, Holando. [1]

S-o Lukacs, Cluj, Rumanujo, Victoriei 89, sendas rumanajn poŝtmarkojn kontraŭ alilandaj. [1]

S-o Emeriko Boskovitz, profesoro, Cluj, Rumanujo, Calea Regele Ferdinand 21, interŝanĝas poŝtmarkojn k. ĉ. l. [1]

Kun junaj knabinoj de la tuta mondo korespondas volonte per il. pk. fraŭlo Wilhelm Kugler, strada Castelului 2, Braŝov, Rumanujo. [1]

F-ino Mitzi Beer, strada Castelului 156, Braŝov, Rumanujo, deziras korespondi per il. pk. k. ĉ. l. [1]

Junuloj, La jenaj kursoroj deziras tutmondajn korespondantojn: Sidney Brown, (16 jara fraŭlo), Hilda Ormanroyd, (15 jara knabino), Norman Fortune, (10 jara knabo), Winifred Fortune, (12 jara knabino), Leslie Fortune, (12 jara knabino), James Mackbinder, (16 jara fraŭlo), Edith Isherwood, (20 jara fraŭlino), Clara Robinson, (21 jara fraŭlino). Adresu lerterojn aŭ pk. al 17, Chesham Street, Bradford, Anglujo. [1]

F-ino Margaret Newboul (jurnalistino) 17, Chesham Street, Bradford, Anglujo, deziras korespondadon precipe kun rusoj, ĉinoj, japanoj, italoj, kun jurnalistoj tutmondaj kaj kun ĉeaj kursorojj pri metodoj lernigi Esperantojn-Interŝanĝas Esperantajn librojn por infanoj. [1]

S-o I. Szalay, Gézor utca 9, Kaposvár, Hungariujo, deziras interŝanĝi pm. k. ĉ. l. [1]

S-o Petr A. Petrov (22-jara), en Tirnovu, ul. „Asenova“, Bulgario, deziras korespondi kun tutmondanoj per il. pk. kaj l. Certe respondas. [1]

Dezirante kolekti pm. speciale por propagando de Esperanto samideano Szcze, Delegito de UEA, str. Warszawska 12, Radom, kaj samideano W. Kijak, poŝtisto, Radom, Polujo. [2]

Filatelistoj! Interŝanĝas ĉiujlandajn pm. (prefere ekster-eŭropaj) aŭ paperronojn kontraŭ danzigaj kaj germanaj pm., kor. per pk. il. bfl. Respondas tuj. Oskar Köhler, Oelsnitz i. Vogtl. Bergstr. 5 (Germanujo). [1]

Filatelistoj! Por 2 sviz. fk. aŭ egala valoro mi sendas 500 div. malofajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig, interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölpnitz i. Vogtl. Bergstr. 5. [1]